

# Mi nokte havis songon

## ICH HAB DIE NACHT GETRÄUMET

1. Mi nok - te ha - vis son - ĝon,  
2. La be - do es - tis tom - bo,  
koŝ - ma - ron pe - zan. Jen: \_\_\_  
tom - be - jo la ĝar - den'. \_\_\_  
En mi - a hort' ek - flo - ris  
Fo - li - oj, flo - roj fa - lis  
ar - bed' \_\_\_ de ros - ma - ren'. \_\_\_  
de l' ver - da ros - ma - ren'. \_\_\_

3. La florojn mi kolektis  
en kruĉ' el fajna or'.  
Ĝi glitis rompiĝante  
el miaj manoj for.
4. El ĝi gutetojn, perlojn  
elflui vidis mi. –  
Ĉu ĉi koŝmar' signifas,  
karul', ke mortis vi?

ICH HAB DIE NACHT GETRÄUMET • M: popola, antaŭ 1775 • germana T:  
1880 ĉe August Zarnack • E: Albrecht Kronenberger 2024-04-26 (sen memori,  
ke jam ekzistas traduko de Adolf Burkhardt)

*Jen la traduko de Adolf Burkhardt:*

1. Mi nokte peze songis: jen sube en mia ĝarden'  
elkreskis verda arbedo; ĝi estis rosmaren'.
2. Tombejo la ĝardeno kaj tomb' la floro-bed';  
defalis kron' kaj floroj de verda ĉi arbed'.
3. La florojn mi kolektis en mia ora kruĉ'.  
El mia man' ĝi glitis, rompiĝis – krako! muĝ'!
4. Mi vidis perlojn flui kaj gutojn de ruĝa roz'.  
Plej kara, ĉu la morton signifas la song-moroz'?

*E: Adolf Burkhardt 1986*

*Jen la germana originalo:*

1. *Ich hab die Nacht geträumet / wohl einen schweren Traum,  
es wuchs in meinem Garten / ein Rosmarienbaum.*
2. *Ein Kirchhof war der Garten, / ein Blumenbeet das Grab,  
und von dem grünen Baume / fiel Kron und Blüte ab.*
3. *Die Blüten tät ich sammeln / in einen goldnen Krug,  
der fiel mir aus den Händen, / dass er in Stücken schlug.*
4. *Draus sah ich Perlen rinnen / und Tröpflein rosenrot:  
Was mag der Traum bedeuten? / Ach Liebster, bist du tot?*

*bei August Zarnack*